


Analizo de instrua sukceso

Ne ofte okazas, ke esperantistoj povas vanti pri la sukceso de siaj kursoj: tro malmulte da kursoj, kun tro malmulte da lernantoj, plej ofte malhomogenaj je aĝo kaj kultura nivelo, kaŭzas ke al Esperanto venas malpli da personoj, ol estus atingeblaj per pli sciencaj, planitaj kaj riĉaj rimedoj.

Antaŭnelonge ILEI, la internacia ligo de esperanto-instruistoj, volis per eksperimento prui, ke instruado de Esperanto al lernejoj infanoj donas al ili nekontesteblajn avantaĝojn. Tial ĝi aranĝis plurnacionan instruadon, surbaze de komuna lernolibro kaj komuna vortprovizo, kun interlernejoj kontaktoj dumjaraj kaj kun fina sesio en komuna lernejo.

La eksperimento brile sukcesis, kaj ILEI onoras ĝin per publikigo de la raporto kaj de la rezultoj. La aŭtoro, Helmut Sonnabend, estas la prezidanto de la Ligo, kaj mem valora pedagogo. La kunlaborantoj estas la instruistoj de pluraj landoj, kiuj kontribuis al la eksperimento, kaj la infanoj mem, kiuj per sia lernado helpis la sukceson de la provo.

La libro, eldonata de la internacia eldonejo **Edistudio**, en la tradicia luksa aspekto, prezentas, per tekstoj kaj grafikaĵoj, la tutan historion de la eksperimen-



mento kaj la pedagogiajn detalojn de ĝi.

157 paĝoj en normformato A5 (21 cm.), luksa papero, klaraj litertipoj, zorga broŝurado, karakterizas tehniko la libron, kiun vi povos fiere donaci al la skeptikuloj pri la eblecoj de Esperanto.

La vendoprezo estas nur

Helmut Sonnabend

Esperanto:
lerneja eksperimento

- raporto
- analizo
- konkludo

Edistudio, 1979

12 gld. aŭ egalvaloro (7.000 lirojn); la vendokondiĉoj la kutimaj ĉe **Edistudio**: antaŭpage sen sendokostoj, aŭ postfature kun 10% sendokosto; rabato de 33% por mendoj de almenaŭ tri ekzempleroj. Disponebla ĉe ĉiuj libroservoj aŭ rekte ĉe:

Edistudio · c.p. 213 · I-56100 Pisa · Italujo · pĉk 12230561 · tf. + 39/50/48670

Survoje al restrukturiĝo de la esperanta faka agado

Kien ni venus
Se ĉiuj dirus
Kien ni venus
Kaj neniu irus
Nur por rigardi
Kien ni venus
Se ni irus

Kurt Marti

(El svisa berna dialekto)

Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) ekfunkciis jam en 1906, kvankam ĝi fondiĝis nur en 1908. Tuj ĝi fariĝis unu el la plej prestiĝaj fakaj asocioj de UEA, ĉar aliĝis multaj membroj el naciaj sciencaj akademioj kaj aliaj famuloj. (Tre interesa super-rigardo de la unuaj 50 jaroj aperis en **SCIENCAJ STUDOJ**, 1958.) Tamen post la krizo ŝuldata al la dua mondmilito kaj pro la pli kaj pli specialiĝanta mondo, la scienc-faka agado strebis organiziĝi en diversaj asocioj kaj ne plu en unusola. Nuntempe ISAE alvenas al punkto, kie ĝi fiaskos, se ĝi plu emus fariĝi memcela, neglektante sian veran kunordigan celon, kiun ni nuu pli precizigu.

En la faka agado partoprenas multaj diversaj asocioj (dum la 68-a Universala Kongreso en Budapeŝto aliĝis al UEA la 32-a: IKEL), sed ili bedaŭrinde malmulte kunlaboras inter si kaj daŭre foruzas sian energion je la samaj taskoj pro manko de interinformiteco, dum restas multegaj problemoj, pri kiuj ni ne havas tempon por eĉ pensi.

Dum la 68-a UK, precipe en la kunveno de ISAE, sed ankaŭ en aliaj kunsidoj, evidentiĝis, ke ISAE devas transpreni tiun interligan taskon, eldonante informbultenon: **ISAE INFORMAS**. Ĝi sendiĝus aŭtomate al ĉiuj membroj de la diversaj scienc-fakaj asocioj, diskonigante informojn pri la asocioj mem, pri iliaj planoj, atingoj, renkontiĝoj k.t.p. Ĝi nepre devos anonci frue ĉiujn fakajn aranĝojn kaj helpi al iliaj realigoj, interalie per varbado de partoprenantoj. Unuvorte, ISAE estas la tegmenta, kunordiga centro de la faka agado. Ĝian praktikan formon ni nun prezentu.

1. ISAE nepre estas registrita asocio por ebligi ĝin oficialan agadon en ĉiujn landoj. Se la statutoj de ISAE kaj UEA tiucele modifiĝus, ISAE eĉ povus fariĝi integra parto de UEA.

2. Ĉiu membro de kiuj ajn scienc-faka asocio estas aŭtomate membro de ISAE.

3. Fakuloj el branĉoj, kiuj ankoraŭ ne havas propran asocion, aliĝas rekte al ISAE.

4. ISAE eldonas laŭeble plej ofte, en la komenco almenaŭ 4-foje jare, ISAE INFORMAS kaj distribuas ĝin plej rapide, ĉu rekte, ĉu pere de la fakaj asocioj, al la fakuloj de la mondo.

5. La financaj rimedoj venas kaj de la fakaj asocioj, kiuj pagas iun proporcion sumon por siaj membroj, kaj de la rektaj membroj, kiuj pagas indvidue. Memkompreneble oni povas aboni ISAE INFORMAS sen aliĝi al iu ajn asocio.

6. La rektaj membroj de ISAE plue ricevas la oficialan organon SCIENCA REVUO.

7. En kunlaboro kun Scienca Eldon-Centro de UEA (SEC), ISAE subtenas la eldonadon de scienc-fakaj verkoj kaj kunordigas la kompiladon de SCIENCA BIBLIOGRAFIO ESPERANTLINGVA.

8. En kunlaboro kun terminologiaj institucioj, ISAE kunorganizas la terminologian laboron kaj la diskonigon de fakaj terminaroj; la fina celo estas la eldono de PLENA SCIENC-TEĤNIKA VORTARO DE ESPERANTO.


9. Alia tre grava tasko de ISAE estas helpi al la kunordigado kaj organizado de scienc-fakaj konferencoj, seminarioj k.t.p. Precipe temas pri varbado de aliĝantoj kaj pri senmona interŝanĝo de partoprenantoj inter ekonomisistemoj.

Ni memkompreneble devos aprobi novan statuton de ISAE kaj organizi novan komitaton/estraron. Tamen en unua ŝtupo, provcela, ni certe povos ekfunkciigi la novan ISAE sur la malnovaj bazoj senŝanĝe, almenaŭ ĝis kiam eblos kunvoki ĝeneralan asembleon de fakaj asocioj.


Ni tre forte esperas, ke ĉiuj fakaj asocioj kaj Universala Esperanto-Asocio kunhelpos al la transformado de ISAE, kiun postulas la esperantlingva faka agado en nia moderna mondo. Nur kune eblas efike alfronti la 100-jariĝon de Esperanto.

Christian Darbellay
ĝenerala sekretario de ISAE

Skemo de la ĝisnuna situacio



Skemo de la novstruktura organizo



Legendo: FA faka asocio

- - - lozaj, pli-malpli hazardaj kontaktoj

— organizitaj ligoj inter la FA